# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Jaro 43-a BRAZILO, APRILO-MAJO-JUNIO 2019 N-ro 174


"Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem." Jesuo (*Mt*, 22:37-40).

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro." Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

"Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian." Zamenhof. *La Espero*.

## Speciala Eldono de Komunikoj Omaĝe al

# Alberto Flores, Vera Homarano!



La brazila emerita inĝeniero pri metalurgio Alberto Flores, konsilanto de Asocio Lorenz, konstanta kunlaboranto de **Almanako Lorenz** kaj la trimonata bulteno **Komunikoj**, brila verkisto, aŭtoro de la libro en la portugala lingvo, **Cartilha de Esperanto**, kune kun Vicente Paulo Werneck; preleganto pri Esperanto kaj Spiritismo, post 96 jaroj en la fizika korpo, longa kaj fruktdona laborado, forlasis la materian veston en la 1-a de majo 2019 por reeniri en la spiritan mondon, nia vera hejmo. Sen ia dubo, Alberto Flores plenumis sian taskon pri Spiritismo kaj Esperanto. Flores ĉiam havis junan animon. Senlace kaj entuziasme li instruis kaj diskonigis la internacian lingvon. Ni rememoras, okaze de la 40 jara datreveno de nia Eldonejo, kiam li, ĝoje, diris ke ĝis nun li instruas Esperanton kaj ke ĝi estas la plej efika kuracilo kontraŭ Alzheimer, kaj li pravis, ĉar ĝis la fino de la fizika vivo, la rezonado de Flores estis perfekta.



La junuloj Délio Pereira de Souza, fondinto de Eldonejo Lorenz, kaj Alberto Flores

"Mi ĉion faras hejme. Mi estas tute memdecida kaj sendependa kaj konstante laborigas mian cerbon. Esperantostudado estas esperantoterapio."

ALBERTO FLORES

Kara frato, amiko, samideano Flores, nova etapo komenciĝas por vi, kune kun la karaj fratoj, jam en la spirita mondo, F. V. Lorenz, Zamenhof, Délio, Ismael... Sendube vi estis (as) frata amiko de ni ĉiuj, modelo de esperantisto, vera homarano, disĉiplo de Zamenhof! Dio vin benu kaj koran dankon! Ĝis baldaŭ!

LA ESTRARO DE LORENZ



La instruisto Alberto Flores

# EROJ EL LA INTERVJUO KUN ALBERTO FLORES EN ALMANAKO LORENZ 2012

**KIAL VI ESPERANTISTIĜIS?**

— Pro la bela idealo de frateco, amikeco kaj paco de Esperanto. Ili kaptis min.

Kion signifas Esperanto en via vivo?

— Esperanto estas parto de mia ĉiutaga vivo; ĝi estas mia amata okupo; ĉiutage mi legas, skribas, relernas kaj praktikas la lingvon.



Flores instruas Esperanton

**ĈU VI MULTE INSTRUIS LA LINGVON INTERNACIAN?**

— Jes. Mi jam okazigis diversajn E-kursojn ĉe spiritismaj societoj, lernejoj kaj de 14 jaroj mi instruas E-n por maljunuloj ĉe “Centro por plibonigi la sanon de maljunuloj”, de la Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj” de la urbo Volta Redonda, subŝtato Rio-de-Ĵanejro.



Disdonado de atestoj al gelernintoj de la 17-a Baza Kurso de Esperanto, okazinta en Volta Redonda, 2015.
Instruisto: Alberto Flores

**KIAM KAJ KIAL SPIRITISMO ENIRIS EN VIAN VIVON?**

— Mi estas preskaŭ denaska spiritisto, ĉar tia estis mia kara patrino. En nia hejmo estis multe da spiritismaj libroj kaj revuoj. Do, de longe mi komencis legi, kaj ankoraŭ legas, verkojn pri la spiritisma doktrino kaj pri la historio de kristanismo.

**KION SPIRITISMO SIGNIFAS EN VIA VIVO?**

— Spiritismo kaj Esperanto estas nun miaj ĉefaj okupoj. Mi ne eblas imagi mian vivon sen ili. La ideo kaj la idealoj de ambaŭ kompletiĝas kaj plenigas mian vivon.



Alberto Flores estas la dua de dekstre,
okaze de la 40-a datraveno de Asocio Lorenz


## Senpagaj Libroj...

**Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al**

**editora_lorenz@uol.com.br**





LORENZ

**“KOMUNIKOJ”**

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 43-a – n-ro 174 | Aprilo-Majo-Junio 2019

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

**KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:**

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: **+ 55-21-2221-2269 - + 55-21-2450-4768**
Skajpo: **Lorenz Editora** | Fejsbuko: **Editora Lorenz** | Retadreso: **editora_lorenz@uol.com.br**
Retpaĝo: **http://editoralorenz.blogspot.com.br**




Kompostita de Rogério Mota

### KIAL VI LONGE APOGAS LA AGADON DE ELDONEJO LORENZ?

— Eldonejo Lorenz estas la konkretigo de la revo de multaj esperantistoj-spiritistoj: disvastigi Evangelion kaj Spiritismon tra la mondo pere de Esperanto. Sankta kaj utila afero. Bona por Spiritismo, kaj bona por Esperanto, ĝi ĝojigas nian koron kaj ĝi estas nia orgojlo. Mi apogis, apogas, kaj ĉiam apogos la agadon de Eldonejo Lorenz. Mi konis persone F. V. Lorenz, afabla homo, simpla, modesta, erudicia genia poligloto, spiritisto, mediumo, poeto, verkisto, praktika kuracisto, instruisto en elementa lernejo.

### VIAJ LASTAJ VORTOJ AL ĈIUJ FRATOJ EN HUMANECO

— Ni havu esperon kaj estu kuraĝaj. La bonaj ideoj ĉiam venkas. Nia spiritisma-esperantista laboro helpas la progreson de la homaro. La estonta pli bona mondo dependas de nia nuna agado. Dio fidas je ni kaj ni devas fari nian parton. Pacon al vi!




De maldekstre: Benedicto Silva, Ismael Miranda kaj Alberto Flores, okaze de la 41-a datreveno de nia eldonejo, kiam Benedicto kaj Flores estis la prelegintoj ĉe Brazila Spiritisma Federacio.

E E E

**VORTOJ DE ALBERTO FLORES KIAM NIA ELDONEJO KOMPLETIGIS 40 JAROJN:**

**La apero, antaŭ 40 jaroj, de Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz konkretigis noblan revon de kelkaj spiritistoj-idealistoj: disvastigi, tra la mondo, la luman trilogion Esperanto-Evangelio-Spiritismo pere de la internacia lingvo kreita de nia kara bonfarinto de la homaro, D-ro L. L. Zamenhof. Tiel, nun, ni kun plezuro ĝuas la legadon de la eldonaĵoj de Asocio Lorenz, t.e., bonegajn librojn, la utilan bultenon "Komunikoj" kaj la tre valoran, jaran internacian "Almanako Lorenz". Varmajn gratulojn al Eldonejo Lorenz!**



**KUNLABORU!** – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

***COLABORE!** – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!*

# KUNLABORO | *Alberto Flores*

Tiu substantiva vorto estas kunmetaĵo kreita per la kuniĝo de du aliaj vortoj: unu estas KUN, prepozicio kiu signifas: akompanon, kune esti; la alia estas vorto derivita de la verbo LABORI; el ĝi devenas la substantivo LABORO, kiu signifas uzi siajn korpajn aŭ mensajn fortojn por produkti aĵon, plenumi taskon aŭ atingi efikojn, fizikajn aŭ mensajn.



La vorto KUNLABORO enhavas ideon pri kooperado por atingi difinitan celon, estu ĝi ekonomia, socia aŭ kultura. Kunlabori estas kunhelpi alian personon aŭ asocion, por faciligi al tiu ĉi atingi siajn celojn, aŭ efektivigi siajn revojn aŭ planojn. La KUNLABORO estas tre nobla kaj laŭdinda afero. Kiam ni kunlaboras ni sentas nin kontentaj kaj feliĉaj, ĉar ni fariĝas utilaj kaj helpemaj. Se vi ne kredas je la valoro kaj utileco de kunlaboro, pripensu pri kio okazas al iu veturilo (vagono, kamiono, aŭtomobilo, ĉaro ktp.) se unu el la radoj decidas ne plu kunlabori, ĝi rompiĝas aŭ ĉesas funkcii. Certe okazos akcidento, ĉu ne?

Eĉ malgranda kunlaboro estas efika. Observu kio okazas kiam malgranda radeto de via horloĝo faras strikon. Via horloĝo ĉesas funkcii kaj tio certe multe ĝenos vin! Rimarku kiel, en via korpo, la kunlaboro estas deviga kaj ĝi okazas ĉiumomente. Via dekstra mano ĉiam kunlaboras kun la maldekstra por preni aŭ fari ion. Ekzemple: balai domon, stiri aŭtomobilon ktp. Observu ke unu el viaj kruroj ĉiam helpas (kunlaboras) kun la alia, por ke vi bone marŝu! Ankaŭ rimarku ke la diversaj organoj de via korpo estas ĉiam kunlaborantaj unuj kun la aliaj. Se unu organo ne kunlaboras kaj malbone funkcias, certe vi malsaniĝos kaj bedaŭros ke via koro, aŭ via hepato, aŭ via reno, aŭ viaj pulmoj ne volas kunlabori por via bonfarto.

En la esperantista movado ni povas kunlabori diversmaniere. Ni kunlaboras se ni pagas akurate nian kotizon, se ni partoprenas en la kunsidoj, organizas aŭ instruas en E-kursoj, aĉetas (kaj legas) librojn, abonas revuojn en Esperanto ktp.

Mi estas tre favora al la kunlaboro de esperantistoj kun neesperantistaj organizaĵoj, ĉar, ĝenerale, la neesperantistaj asocioj havas pli fortan povon ol niaj esperantistaj kluboj. Ekzemple: mi kaj amikoj jam de 17 jaroj kunlaboras kun la "Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj" de la urbo Volta Redonda, - ŝtato Rio-de-Ĵanejro. Tiu asocio zorgas pri la informado de senpaga E-kurso, kiun ni okazigas ĉiun jaron en ties bela sidejo. Tie ĝi disponigas al ni tre komfortan lerno-ĉambron kun bona lumigado kaj ventolado, blankan tabulon, multajn brakseĝojn por faciligi la skribadon, horloĝon kaj projekciilon. La lecionoj okazas unu fojon en la semajno, merkrede, matene, kaj daŭras du horojn. En la mezo de la leciono, ni faras paŭzeton por trinki kafon kun biskvitoj (ĝentileco de la asocio). Ĉi-jare okazas la 17-a senpaga E-kurso en tiu asocio de emeritoj, kies estraro estas tre kontenta pri la kunlaboro kun esperantistoj. Do, se vi volas senti vin utila, vi nepre devas esti helpema kaj kunlaborema, ĉar per via kunlaborado al la Esperanto-movado vi certe fariĝas tre kontenta kaj feliĉa homo. Ni laboru kune!

El Almanako Lorenz 2016




Alberto Flores kun la edzino Clecy Zamora kaj la filino Maria Carmen

# La Spiritisto Alberto Flores (1923/2019)

Eurípedes Alves Barbosa

Braziljo, Federacia Distrikto, Brazilo

La 30-an de aprilo 2019, forpasis nia karmemora samideano Alberto Flores, kiu naskiĝis la 9-an de junio 1923, en la urbo Sankta Maria, subŝtato Suda Riogrando. Li estis tre agema esperantisto kaj fervora spiritisto.

Li estis preskaŭ denaska spiritisto. Lia patrino estis spiritisto kaj havis multajn spiritismajn librojn kaj revuojn. Kvankam en la infanaĝo, Alberto Flores interesiĝis iomete pri la legado de tiuj publikaĵoj, sed li fariĝis vera spiritisto, kiam li komencis labori profesie, post la fino de sia lernado en duagrada lernejo. Tiutempe li abonis jenajn spiritismajn revuojn: Reformador (Reformanto), Revista Internacional de Espiritismo (Internacia Revuo pri Spiritismo kaj Reencarnação (Reenkarniĝo).

Poste, Alberto fariĝis membro de Federacia Konsilantaro de Spiritisma Federacio de Suda Riogrando. Kaj tiel li amikiĝis kun ĝia prezidanto, sinjoro Francisco Spinelli, kaj kun aliaj famaj spiritistoj de tiu subŝtato.

En oktobro 1951, Porto Alegre, ĉefurbo de Suda Riogrando, estis la sidejo de ties dua spiritisma kongreso. Okaze de tiu grava evento, Alberto prezentis la tezon "Esperanto kiel lingvo utila por helpi Spiritismon". Tio estis la unua kunlaboro de Alberto por disvastigi Esperanton inter spiritistoj.

En 1954, Alberto Flores iĝis inĝeniero pri metalurgio kaj transloĝiĝis al 'Volta Redonda', urbo el la subŝtato Rio-de-Ĵanejro, kie li komencis labori ĉe CSN - Companhia Siderúrgica Nacional (Nacia Siderurgia Kompanio) kaj ankaŭ komencis kunlabori en la tiea spiritisma movado.

En spiritismaj societoj de Volta Redonda, li prelegis multfoje pri spiritismaj temoj kaj ĉiam li enmetis kelkajn informojn pri Esperanto. Alberto intense agadis ĉe "Associação Espírita Estudantes da Verdade", "Centro Espírita a Caminho da Luz", "Centro Espírita André Luiz" kaj aliaj. En "Centro Espírita a Caminho da Luz" (Spiritisma Centro Vojo al la Lumo), li estis gvidanto de la junularo kaj volontulis ĉe la biblioteko.

Ĉe "Asocio Estudantoj de la Vero", Alberto unuafoje gvidis kurson de Esperanto al 80 gelernantoj. Je la fino de tiu kurso, li fondis la organizaĵon Volta Redonda Esperanto-Klubo (VREK). Poste li gvidis diversajn aliajn E-kursojn ĉe la spiritismaj societoj "Spiritisma Centro Vojo al la Lumo" kaj "Spiritisma Centro André Luiz".


Alberto Flores verkis dekojn da artikoloj pri Spiritismo kaj Esperanto, kiuj aperis en Reformador, RIE kaj en aliaj periodaĵoj. Eble la plej valora kunlaboraĵo de Alberto Flores favore al Spiritismo estis la tezo, kiun li verkis kaj prezentis dum la "Internacia Spiritisma Kongreso", okazinta de la 1-a ĝis la 5-a de oktobro 1989, en Braziljo, ĉefurbo de Brazilo. La tezo ricevis la titolon "Esperanto kiel lingvo de la monda spiritisma familio kaj kiel ilo por la disvastigado de spiritismo".

La edzino de Alberto Flores, Clecy Zamora Flores, ankaŭ estis spiritisto kaj bone posedis Esperanton. Ŝi forpasis en 2011, post feliĉa kunvivado kun Alberto dum 64 jaroj.

Ary Zamora, bopatro de Alberto, estis spiritisto kaj grava pioniro de Esperanto en Porto Alegre. Li naskiĝis en Urugvajo kaj fariĝis brazila civitano. Li instruis Esperanton ĉe Spiritisma Federacio de Suda Riogrando.

Malgraŭ sia maljunaĝo, Alberto ne rezignis la instruadon de Esperanto ĉe "Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj" en Volta Redonda. Li multe legadis pri kristanismo, pri la vivo de Jesuo, pri spiritismo kaj pri Esperanto.

Kiel okazos al ni ĉiuj, alvenis al fino la tempo de Alberto Flores sur la terglobo, post fruktodona kaj laborplena ekzistado. Tiu granda spirito revenis al la vera Patrujo.




Karaj geamikoj
el la tuta mondo,
se vi volos ricevi,
senpage, pere de
Interreto, pdf-ajn versiojn de
Almanakoj Lorenz,
sciigu al ni vian retadreson
kaj kun granda ĝojo
ni ilin sendos al vi:

**editora_lorenz@uol.com.br**

# *Estimata kompano Alberto Flores,*

La teamo de Eldonejo Lorenz dankegas Dion pro la longtempa privilegio kunvivi kun vi, ĝuinte viajn simpation, saĝecon kaj vivoforton! Certe, viaj instruoj kaj ekzemploj ade fruktodonos kaj prilumos niajn vojojn kvazaŭ ia mistera forto, necesa en la batalo por la konstruado de iu mondo pli humana, frata kaj senobstakla!

**Estu ĉiam sub la protekto de Dio, nobla kunvojaĝanto!**


Alberto Flores


La instruanto Flores


Gelernantoj de la kurso de E. ĉe Asocio de Emeritoj ka Pensiuloj


Flores kaj edzino dum la Germana Kongreso de Esperanto 1959


Alberto Flores kaj Zamorra


Flores gastiĝas ĉe germanaj gesamideanoj